

Heinrich Heine,

## Pinarbo staras sola

*tradukita de Friedrich Pillath*

Pinarbo staras sola

En nordo sur nuda altaĵ'.

Ĝi dormas; el neg' kaj glacio

Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Songadas ĝi pri palmo

Ĝemanta en orient',

Soleca, sur arda deklivo

En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.*